

Aaron David Irvine,  
De sango al ŝanĝo

Bonkoraj feliĉstrebantoj tre multas,  
Sub lumo sune beloranĝa,  
Sur lando suke belverdega;  
Tia bunta kulturparo vivigus,  
Sed gutas la sango.

Bonegaj donacaĵoj nin abundas,  
Merkat' mizeras ne ĉiloke,  
Natur' neglektas ne ĉitempe;  
Utopie ridriĉaj ni fariĝus,  
Sed fluas la sango.

Bonoreloj entimbruaj jam surdas,  
Puŝadas moroj nin fieĝen,  
Baldaŭas paco nur voĉdonen;  
Ja peace-síocháin-on kune ekatingus,  
Se pretus al ŝanĝo.

*Verkinto de tiu ĉi Esperanta poemo estas Aaron David Irvine, publikigita 1994-07.*

*Arg-1103-2228 (2014-12-18 23:32:59)*

*Mi, Manfred Retzlaff, ricevis tiun ĉi poemon en 2014-12-18 de s-ro Aaron David Irvine (reta adreso: irudel@gmail.com).*